




Antaŭaĵoj de la afero



Kiam, somere de la jaro 1905, Lazaro Ludoviko Zamenhof prezidis, en la franca urbo Bulonjo-sur-Maró, la unuan universalan kongreson de Esperanto, li estis travivinta grandan penadon kaj malfacilaĵojn por efektiviĝi tiun realaĵon: ke la lingvo – tiam jam nomata Esperanto – fariĝu parola lingvo de movado sin dediĉanta al ties disvastigado. Ekde la jaro 1887, kiam estis eldonita la unua lernolibro pri tiu universala lingvo, Esperanto, fakte, estis nur skriba, sed ne parola lingvo. Tre intensa korespondado inter Zamenhof kaj unuaj simpatiantoj de la afero kaj unuaj E-kluboj montris la taŭgecon de Esperanto por la interkomunikado inter malsamlingvanoj kaj kuraĝigis entrepreni la fazon de starigo de Esperanto-movado konstituita de homoj el la tuta planedo.

Kiel dirite, Zamenhof devis supervenki multajn malfacilaĵojn. La eldonado de la unua libro pri la lingvo internacia en la jaro 1887 eblis nur dank' al la financa apogo de la bopatro de la iniciatinto de Esperanto. Kaj antaŭ tiu jaro Zamenhof tre devis penadi por antaŭenpuŝi sian projekton. Ne decas ripeti ĉi tie la historion de la komencaj jardekoj

de la esperantista afero. La esperantistoj sufiĉe konas tiun periodon kaj krome ekzistas bonaj verkoj kiuj pritemas tiun aferon. Ni reliefigos nur tiujn okazintaĵojn, kiuj iamaniere influis en – aŭ rilatas al – la ekestiĝo de la esperantismo en Hispanio kaj en nia Asturia regiono.

La universalaj kongresoj de Esperanto, tiu menciita de Bulonjo-sur-Maró kaj tiuj sekvintaj en Genève, Svislando (1906), Cambridge, Britio (1907), Dresden, Germanio (1908)... utilis por ke la granda publiko eksciis pri la ekzistado de tiu lingvo-projekto. Sed jam antaŭ la jaro 1905 kelkaj fakuloj kaj interesitoj pri la lingva problemo konis la ekzistadon de la kreaĵo de Zamenhof kaj kontaktis kun li pri tiu temo. En Hispanio, konkrete, jam en la jaro 1890 estis eldonita lernolibro de Esperanto, iniciate de José Rodríguez Huertas el Malago, kaj en la sekvinta jaro, ankaŭ en la urbo Malago, estis

kreita, la unua esperantista grupo de Hispanio fare de la sama Rodríguez Huertas, kiu gvidis tie lernokursojn. Menciinde estas ke en tiu epoko, krom tiu de Malago ekzistis esperantistaj kluboj nur en Nuremberg, Munkeno, Friburgo kaj Upsala.

En la jaro 1897 estis kelkaj hispanaj aliĝintoj en la Internacia Esperanta Movado gvidata de L.L.Zamenhof, kaj en la sekva jaro, Francisco Pi-i-Margall, eksprezidento de la unua hispana Respubliko propagandis pri Esperanto per artikolo en iu madrida ĵurnalo, kaj pliaj du gazetaj artikoloj en la jaro 1900. En Madrido gvidis la unuan kurson de

Esperanto, en la jaro 1899, Ramón Andreu, kiu ankaŭ publikigis en iu revuo resumon de la Esperanta gramatiko. Inter la lernantoj de tiu kurso estis iu arma oficiro, Vicente Inglada Ors, kiu poste gvidis E-kursojn en Barcelono.

En la jaro 1901 oni publikigis artikolojn pri Esperanto en Olot kaj Santander, kaj evidentiĝis Esperant-favora aktivado en Barcelono kaj Coruña fare de simpatiantoj de la afero kiuj, tamen, tiam ankoraŭ ne konstituis organizitajn grupojn. La unua Esperanta gazeto en Hispanio aperis

en Santander en la jaro 1902, ĝi titoliĝis *Esperanto* kaj ties kreinto kaj ĉef-redaktoro estis Andrés Bravo del Barrio. En la sama jaro fondiĝis en Murcio Esperanto-Societo. Daŭre estis kursoj kaj artikoloj pri Esperanto en diversaj lokoj en la lando, kaj en la jaro 1903 la disvastiĝo de la movado estis speciale rimarkinda en Katalunio, Murcio kaj la Valencia regiono. Tiam aperis ankaŭ la unuaj esperantistoj en Eŭskio, Valladolido kaj la Aragona regiono. Sed la plej grava esperantista evento de tiu jaro estis la fondiĝo de tutlanda esperantista organizaĵo nomata **Hispana Societo por propagando de Esperanto (H.S.p.p.E.)**. Ĝi daŭris, kun tiu nomo dum kelkaj jaroj; oni povas diri ke, iamaniere, ĝi estis antaŭaĵo de la nuntempa tutlanda organizo **Hispana Esperanto-Federacio**, fondita en la jaro 1947. En la jaro 1904 la eldonejo **ESPASA** de Barcelono publikigis Esperantan Ko-



Vicente Inglada Ors